ORGANIZA SOCIETO DE INTERNACIAJ ESPERANTO-KONFERENCOJ
**http://osiek.org**

# Internacia Esperanto-Konferenco – 2008

en Slovenio, 12-18.07.2008.
Šempeter pri Gorici / Šempeter ĉe (Nova) Gorica

## Temo: Fernando DE DIEGO, vivo kaj verkaro

**Organizanto:** ORBIS PICTUS de Višnja Branković, Via Parini 5, 34129 Trieste, Italio
tel/faks: +39/040 767 875 retadreso: orbispictus@iol.it

**Konstanta adreso:** Eric Laubacher, kasisto de OSIEK
1, rue de Bougainville, 78180 Montigny le Bretonneux, Francio
tel: +33 1 30 96 67 91 retadreso: kasisto@osiek.org

**inter Ljubljana (100 km) kaj Venecio (150 km)**
en regiono de najbarurboj Nova Gorica (Slovenio) kaj Gorizia (Italio)
proksime al maro (Adriatiko, 15 km), montaro (Alpoj), mondfamaj grotoj ...

**Ĉiutagaj prelegoj sekvataj de debatoj. Libroservo**
**Suspensa voĉdonado por OSIEK-premio 2008**
bona internacia etoso de negranda aranĝo ☺ favoraj kondiĉoj kaj prezoj
allogaj proksimaj ekskursceloj ☺ posttagmezaj ekskursetoj dum la konferenco

*Postkonferencaj ekskursoj (dum tri tagoj) aŭ / kaj kunvojaĝo al 93a UK en Roterdamo! VI ESTU BONVENA !*

***Programo de IEK 2008***

**Strukturo:** *antaŭtagmeze* okazos po du prelegoj kun diskuteblecoj. Krom la pritemaj, okazos ankaŭ prelegoj pri la gastiganta urbo-regiono-lando kaj unu el la Aspektoj de la Esperanto-kulturo.
*La posttagmeza programo* kombinos temon, distron kaj turismon. *Vesperoj* estos dediĉitaj al kulturo, amuzo, festado, gastronomio...

**Tema programo:** «Fernando de Diego - vivo kaj verkaro» jam altiras la altnivelajn prelegantojn el diversaj landoj. Venu ĝui iliajn konojn kaj esplorojn!

**Statuta programo:** *ĝenerala asembleo de OSIEK, voĉdonado por OSIEK-premio.*

**Distro kaj turismo:** *riĉa libroservo, porkomencanta kaj konversacia kursoj de Esperanto, Slovena eksprese, infanvartejo / ludejo / kursejo ...*
de la konferenca urbeto Šempeter pri Gorici eblos ekskursi al plej diversaj ekskursceloj en Slovenio kaj Italio, atingeblaj facile kaj bonpreze, iuj eĉ senpage! Trajne, buse, automobile, bicikle, piede...

**La konferencejo kaj konferencurbeto Šempeter:** ni konferencos kaj loĝos *samloke*, en la *nova* mezlernejo kaj la akompana loĝdomo, en simpla, agrabla, antikva urbeto Šempeter pri Gorici / Sankta Petro ĉe (Nova) Gorica (la romia Torgium). De la konferencejo kiu nestas apudmonte vastas la panoramo al la valo de rivero Vipava, la «ĝardeno» de Nova Gorica. La urbeto tuj proksimas, la urbocentro mem atingeblas dum 5-minuta promeno. *Šempeter,* novkonstituita kiel komunumo (en 1998), estas unu el la plej malgrandaj komunumoj en Slovenio (15 km2), mezgranda laŭ la nombro de loĝantoj (6300 loĝantoj) kaj unu el la plej prosperaj. Ĝiaj kontaktoj kun la itala kaj friula kulturoj estas ĉiutagaj, dank' al apudeco de la iama landlimo inter Slovenio kaj Italio, ambaŭ ŝtatoj de EU kaj en la eŭro-zono!

**VENU ANKAU VI ĜUI KUN NI, SENLIME!!!**

***Prezoj kaj teknikaj informoj***

**Loĝado kaj manĝoj:** ni konsilas mendi *duonpensionon en la konferencejo* kio estas la plej praktika, plej bonpreza kaj plej bonetosa solvo, facile aranĝebla pere de la loka organizanto. Ĝi ankaŭ ebligas postprelegajn kun-estadojn dum la komuna tagmanĝo. La loĝdomo estas nova (konstruita antaŭ 7 jaroj) kun nova ekipaĵo kaj meblaro. Inter du ĉambroj troviĝas po unu komuna banejo kaj necesejo.
Por *vespermanĝoj* ni konsilas libere elekti lokojn kaj horojn por gustumi specialajoĵn en la urbeto, aŭ diversloke dum komunaj aŭ individuaj ekskursoj.

***Prezo de duonpensiono:*** 25,00 € persono/nokto en 2-lita ĉambro
( 36,00 € por 1 persono sola en 2-lita ĉambro; konfirmota al interesitoj)
*la prezoj inkluzivas:* tranokton, matenmanĝon, tagmanĝon, turisman imposton

*Loĝado en la hotelo:* ni antaŭrezervis tre limigitan nombron de lokoj en tre proksima hotelo ( kelkaj minutoj piede) kaj al interesitoj pri ili rekomendas rapide kontakti nin por la (antaŭ)rezervo iliaflanka.
Prezo: 42,00 € persono/nokto en 2-lita ĉambro
(ĉ. 70,00 € en 1-persona ĉambro, konfirmota al interesitoj)
*la prezoj inkluzivas:* tranokton, matenmanĝon, turisman imposton

**Krompagoj:** por mendo de loĝado post 20.03.2008 30,00 €, post 10.04.2008 50,00€. **Post 01.05.2008. ni ne plu povos garantii pri la prezoj de loĝado nek pri la ebleco trovi liberajn lokojn, sed ni povos klopodi laŭeble.**

*Prezoj de aparte antaŭmendebla tagmanĝo:* po 5,00 € / 10,00 €
(en la konferencejo / en la hotelo). Kompreneble, en la hotelo eblas manĝi ankaŭ senanonce, laŭ kutima menukarto kaj ties prezoj)

*Prezoj de busbiletoj:*

triesta aerhaveno - Gorizia 2,50 €
Gorizia-Nova Gorica 1,00 € (aŭ piede, kvaronhora promeno)
Solkan-Nova Gorica-Šempeter - **senpaga** (de aprilo 2007)
trajnbileto Trieste-Gorizia 3,55 €

*Interesitoj pri la kampadejo rekte kontaktu www.camplijak.com*
*Ĝi distancas ĉ. 5 km (en Ozeljan 6, SI-5261 Šempas)*

**IEK 2008: VIA BONA ELEKTO!**

### *Aliĝkotizo (en €)*

La Jara Kotizo (JK) al OSIEK estas egalvaloro de 25 poŝtmarkoj por enlanda letero. Por OSIEK-anoj, la aliĝkotizo al IEK estas obligo de la JK, kun minimuma kaj maksimuma valoro.

| periodo | < 2008-02-29 | | | < 2008-03-30 | | | Poste | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| OSIEK-ano | Min | Norm | Maks | Min | Norm | Maks | Min | Norm | Maks |
| | 20€ | 6*JK | 60€ | 25€ | 7,5*JK | 75€ | 35€ | 10*JK | 100€ |
| Nemembro | 80€ | | | 100€ | | | 120€ | | |
| Partatempa partopreno: po 24 € tage | | | | | | | | | |

- ❑ Rabato 50 %-a por junuloj ĝis 26 jaroj, handikapuloj.
- ❑ Rabato 30 %-a por samadresa kunulo de la aliĝinto.

La kotizo inkluzivas: organizajn elspezojn, konferencajn materialojn, partoprenon en la programo, refreŝigaĵojn dum la paŭzoj, minimume unu viziton en la urbo, interkonan bufedon. Ĝi inkluzivas nek loĝadon, nek manĝojn.

La kotizo estas ne repagebla.

### *Solidareca fonduso*

Bedaŭrinde, ekonomiaj cirkonstancoj tre malhelpas kelkajn samideanojn partopreni kaj kontribui al niaj konferencoj. Per via pago al « Solidareca fonduso » ni povas malaltigi konferencajn kaj loĝejajn kotizojn al nivelo akceptebla por ili.

### *Postkonferencaj aranĝoj*

Postkonference ni proponas tritagan (19-21.07.2008.) turisman aranĝon tra Slovenio:
Lago Bled - Idrija kaj Skofja Loka – Ljubljana
Prezo de unu ekskurso: ĉ. 50,00 € (konfirmota)
Eblas plilongigi la loĝadon samloke kaj samkondiĉe en Sempeter.
**Alternative:** eblas aliĝi al **internacia karavano de Orbis Pictus** kiu postkonference direktiĝos al **93-a UK en Roterdamo.**
La interesitoj petu pli kompletajn informojn.

### *Kiel pagi*

La pagojn direktu al unu el la kontoj de Orbis Pictus de Visnja Brankovic ĉe:

- ❑ IT / UniCredit Banca IBAN: IT 72 S 02008 02241 000005590557
BIC SWIFT: UNCRITB10MB, Agenzia Corso Italia 33. IT-34122 Trieste
- ❑ IT / BancoPosta (pĉk): IT 31 A 07601 02200 000023352354
- ❑ B / FEL: orbi-s NL / UEA: orpi-o (nur gis 31.03.08, kun atentigo al ni)

- ❑ FR / kasisto de OSIEK: pĉk de Eric Laubacher: 1 399 87 R Paris